# la naska fasko

La ĉiutaga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto

Numero naŭ
2009-07-09
ĵaŭdo

## Kio okazos hodiaŭ?

**1:30 ptm: ekskurso al *Mission Beach***
**Kie: rendevuu antaŭ *Asante***
*Mission Beach* estas granda kaj belega plaĝo proks. 20 minutojn for per buso #30. La promenejo laŭlonge de la plaĝo prezentas bonan lokon por gustumi la sudkalifornian surf-kulturon.

## *Pri artefaritaj lingvoj*

*de Simono* KEITH

Koncerne la artikolon *Via propra konstruita lingvo: Kial ne?* de Neal WILEY:

Kvankam mi ne scias ĉu aliaj NASKanoj kreis proprajn lingvojn, certe aliaj esperantistoj kreis lingvojn. Du ekzemplojn mi tuj memoris kiam mi legis la artikolon. La plej fama lingvo kreita de esperantisto (krom Esperanto mem) estas *Toki Pona* (esperante nomita Tokipono), fare de Sonja Elen KISA. Ŝia lingvo havas nur 120 vortojn kaj celas simpligi pensadon.

Alia famulo, kiu kreis lingvon, estas Aaron CHAPMAN, unu el la podkastistoj de Radio Verda. Bedaŭrinde mi scias malmulte pri lia lingvo. Eble vi povus intervjui ilin por venonta artikolo. —Amike respondas, Simono

*[Simono estas eksNASKano en Koloradio kiu legas la* Faskon *pere de Interreto.]*

## Libroj aĉeteblaj ĉe Liĉjo

- Wells, J.C. *Esperanto and English Dictionary*. The English Universities Press, 1969. $20.

- Wells, J.C. *Esperanto and English Dictionary*. The English Universities Press, 1969. $24.

  La "Wells-vortaro" estas bonega kaj utila du-direkta vortaro. Tiuj ĉi du ekzempleroj estas fortike tole binditaj, kaj en preskaŭ nova stato. Mi aĉetis ilin simple por iam revendi kontraŭ la sama prezo, kiun mi pagis. La prezo estas iom alta, sed eĉ la ne tre bone broŝurita eldono kostis pli ol $25 kiam ĝi laste estis havebla.

- The "Edinburgh" Esperanto Pocket Dictionary. Nelson, 1962. $8.

  Tiu ĉi "poŝvortaro" estis tre populara, kaj restas utila. Ĝi estas tole bindita, kaj tiu ĉi ekzemplero estas en bona stato.

- *L'Espéranto Sans Peine: La métode 'Assimil'*. Assimil, 1973. $22.

  Tiu ĉi estas bone konata lernolibro por franclingvanoj, kaj tre utila por iu kiu scipovas la francan. Ĝi normale kostas proks. $30… tiu ĉi estas nova ekzemplero kiun mi trovis en rabatvendo por malpli.


# *Nia nova epoko*

*de Ronald GLOSSOP*

Mi ĝojas legi en la *NASKa Fasko* observojn pri la fakto ke la tutmonda socio ŝanĝiĝas de inter-nacia socio al tutmonda socio. En la sesa numero ni legis ke Johann SCHLEYER, la fondito de Volapuko, diris ke "la epoko de mallarĝmensa kaj timema [landa] ŝovinismo estas finita por ĉiam." En la tria numero Reni PORTER bone diris, "Kiam individuoj el multaj nacioj renkontiĝas, tio ne estas vere inter-nacia. Kiam Eduard kaj mi babillas, Belgujo kaj Kanado ne partoprenas—nek la registaroj nek la landoj."

Inter-naciismo estas sistemo en kiu la registaroj de la diversaj landoj kunlaboras, ofte per inter-naciaj organizoj kiel la Ligo de Nacioj kaj la Unuiĝinataj Nacioj kaj la Monda San-Organizo. Tutmondismo estas evoluanta sistemo en kiu individuaj homoj vivas kiel kun-civitanoj de la Planedo Tero. En tutmonda sistemo la landaj lingvoj ne malaperas, sed homoj bezonas krom ili (kaj en unu senso super ili) tutteran lingvon kiel Esperanto. Individuaj homoj devas/os pensi pri si mem, "Kvankam mi estas civitano de unu lando, eĉ pli grava estas la fakto ke mi estas civitano de la planedo Tero." Posedo de tuttera lingvo helpos ilin havi tian novan identecon.

Mi opinias ke alia parto de ĉi tiu ŝanĝo devos esti starigo de tuttera demokrata mondfederacio. La landaj registaroj ne malaperos, sed ili estos sub tuttera registaro same kiel en Usono la ŝtatoj ne malaperas sed ankoraŭ ekzistas sub tutlanda registaro. Sekve mi estas ne nur Esperantisto sed ankaŭ Mondfederisto.



# *Timbuktu la mistera*

*de Drissa Flayoro* DIAKITE

Por tiuj kiuj ne konas Timbuktuon, sciu ke ĝi estas la sesa ekonomia regiono de Malio. Ĝi estas en okcidenta Afriko, en la nordo de Malio aŭ sude de Alĝerio.

Situante en la koro de Okcidenta Afriko, Malio estas franclingva lando kaj laika ŝtato, kun surfacamplekso de 1 248 238 km$^2$. La najbaraj landoj estas Senegalo, Ebura Bordo, Gvineo, Burkina Faso kaj Niĝero. Malio estas en la norda parto de la kontinento inter la 10-a kaj la 20-a gradoj de norda latitudo, ĉe la kruciĝo de la vojo de la dezerta meridiano ĝis la arbaro kaj la granda riverakso okcidenta-orienta. Malio dividiĝas en ok regionoj kaj havas 10 000 000 loĝantojn (nombriĝo de 1998). La registaro nun nombras la popolon.

Timbuktuo estas fama ĉar ĝi laŭ Korano kaj nia propra historio enhavas tombojn de 333 sanktuloj kaj scienculoj.

En la limo de la Saharo, la urbo estas streketo inter la nigra kaj blanka Afrikoj. Timbuktu havas riĉegajn historiojn, tiujn fortigitajn kun la alveno de la tuaregoj, arabo-berberoj, eŭropanoj, muzulmanoj kaj judoj. Turisme oni povas vidi:

- la moskeojn: Ĝiga-Rejbero (*Djingarey-ber*). La kreskiĝo ekonomia, intelekta kaj socio-religia permesis al Kanku Musao, revenante de Meko en 1325, doni 40 000 *mithqal*-oj (*mithqal* estas araba mezuro, proksimume egala al 5 gramoj) al la andaluza arkitekto *Abu Ishaq Al Sahili Al Touwaïdjin* por la konstruaĵo de la Moskeo de Ĝiga-Rejbero, kiu nun estas tre fama loko por turistoj. La registaro de Suda Afriko financis en 2007 la reno-



Moskeo Ĝiga-Rejbero.

vigon de tiu moskeo kaj la skanon de ĝiaj malnovaj manskribaĵoj de la urbo.

- la moskeojn Sankoreo kaj *Sidi-Jaxijao* de la dekvara kaj dekkvina jarcentoj.
- la centron *Axmed-Babao*: centro de dokumentado kaj esplorado historia kiu enhavas librojn estiĝintajn dum la dekkvara jarcento, kun la Centro *Mohamed Bagayoko*, ili enhavas ĉirkaŭ 25 000 studentojn inter 180 koranaj lernejoj kaj moskeoj—Universtato de Sankoreo.
- la domojn de la esplorintoj: estis la germano Henriko BARTHO, la franco Reneo KAJEO (CAILLÉ), kaj la anglo Mungo Parko.
- la metiajn manfaraĵojn tre variajn: ornamaĵojn plektitajn el pajleroj, similante al oro, ponardoj, korboj, tapiŝoj, vaksaj pupoj faritaj de tuaregaj virinoj.
- ekskursojn en la dunoj kaj en la zono de la lagoj (Lago Fagibino estas vera enlanda maro).

*Tradukita kun helpo de mia malnova amiko, Johano Vilhelmo BOHEMIO, Eichstetten, Germanujo.*

# *Parkerigi*

*de Koto FARMER*

Mi faris etan amuzan kanton. La melodio estas de la muzika teatraĵo *Oklahoma!* Sed por ridi pri la afero, oni devas tajpi ĝin tielmaniere, ke oni emfazas la ritmon (kaj, dufoje, la MALritmon de la n-finaĵoj.) Do tajpante mi uzas majusklajn literojn por emfazi tion. Aspektas strange, sed estas uzebla, mi opinias. Liĉjo konsilis al mi en-Faskigi ĝin.

(Kantu laŭ la melodio de *Oklahoma!*. Tion meze de parentezoj, ekzemple "(-ON!)", oni ne kantu, sed laŭte kriu, paŭzu kaj ridu, kaj poste reeĥu la melodion kaj ritmon de la kanto.)

Pa-a-a-a-AR-ke-ri-gi ĉiujn VORT-ojn en la P-I-V
Se vi FAR-us tiun
sub PLE-na lun',
ni ne PLEN-dos, KE vi FAR-is TRO!

Pa-a-ar-ker-IG-i P-MEG
(-ON!)
Ekde PA-ĝo nul' ĝis fina VENK'
Lu-dan-TA-ro, NI,
Fidas JA pri VI,
Vi ne-NI-am SI-dos sur la BENK'!

Ne-NI-am for-GE-su la N!
Iru ĈI-am ĉe RET-paĝ-ar' HO HO HO

Vi-ki-pe-
DI-i-i-I-
-o NUN bezonas VI-i-i-i-I-
(-IN!)
Ĉar VI es-
per-an-TI-ĝas suk-CES-e,
Kaj PLE-ne
Fre-ne-ZI-ĝas, kiel NI!

*La NASKan Faskon* redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas vian helpon!** Ne timu, se vi ne sentas vin komforta pri verkado; Hoss helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn… kion ajn. Sendu viajn materialojn perrete al **<nask.esperanto@gmail.com>** aŭ portu ilin piede al Asante #127.